

Sud-Rejna Kuriero

Aŭgusto
2016

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°63

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

En ĉi-tiu somero refoje abundis eventoj, kongresoj, turismadoj, kiujn la esperantistoj povis partopreni kaj ĝui. La plej grava okazis en Nitro Slovakio, kie pli ol 1260 ĉeestis la Universalan Kongreson. Certe en ĉi-tiu numero ni ne raportos pri la multaj kunvenoj, prelegoj, koncertoj, teatroĵoj, kiuj okazis kaj estis ligitaj al tiu grava historia evento.

En junio okazis en Frajburgo nia amika tago kun telfera turismado. Ni sukcesis oportune plani jarfinan manĝon de nia grupo en restoracio en Sausheim.

En Saint-Louis ni nun ĝuas trankvilan restoracio-salonon ĉe la landlimo al Svislando por niaj verdaj fadenoj.

Ni okulumu al estontaj aranĝoj. La regiona staĝo okazos ĉi-jare en Rastatt, iom malfrue, en novembro. Ne maltrafu ĝin.

Venontjare en marto eblas ĝui agrablan semajnon en suda Francio en Les Issambres por studi, spertiĝi kaj ĝui printempan veteron.

En majo okazos IFEF-kongreso en Colmar kun-organizata kun nia grupo Mulhouse-Esperanto. Vi trovos la aliĝilon kaj la ampleksan programon kun multaj turismaj lokoj en Alzaco, kiujn kompetente dokumentis Edmond.

André Grossmann



Gvatanto ĉe strat-angulo en Bratislava

Programo 2016

ESPERANTO - SOCIETO BASEL

Ĵaŭde 22.9.2016

Monata kunveno : Aktuala temo

Lunde 31.10.2016

Verda fadeno en la restoracio la "Porte de France", en Saint-Louis

Ĵaŭde 24.11.2016

Monata kunveno : Programo

10.12.2016

Zamenhofa-Festo en Francio
supozeble en Colmar

Rigardo al la Svisa Esperanto-kalendaro

Septembro 2016

5-an de septembro 2016, 20h, Laŭzano, Espace Dickens, Rue Dickens 6:

Temo decidota

7-an de septembro 2016, 19h: Flawil en b'treff (apud la stacidomo Flawil): **La membroj de la Esperanto-Klubo Wil rakontas pri siaj kongresaj travivaĵoj.**

16-an ĝis 18-a de septembro 2016: Gîte du Cerneux Billard (Francio, apud la svisa landlimo): **9-a SFERO (Svisa Familia kaj Feria Esperanto-Renkontiĝo)**

24-an de septembro 2016, 10h: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

29-an de septembro 2016, 20h. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafo-klaĉo**

Oktobro 2016

15-an de oktobro 2016, 10h: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

27-an de oktobro 2016, 20h. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafo-klaĉo**

Novembro 2016

19-an de novembro 2016, 10h: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

24-an de novembro 2016, 20h. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafoklaĉo**

Decembro 2016

7-an de decembro 2016, 19h: Flawil en b'treff (apud la stacidomo Flawil): **Tradicia rakledo-vespero de la Esperanto-Klubo Wil.**

15-an de decembro 2016, 20h. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): **Libera kunveno kaj kafo-klaĉo**

17-an de decembro 2016, 10h: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: **Studsabato de CDELI**

Sprachwandel und Sprachschöpfung

Gedanken zum Geburtstag des Esperanto am 26. Juli

Dass es Esperanto gibt, ist eine Besinnung wert.

Sprachwandel

Sprachen wandeln sich. Sie können sterben, und es können neue Sprachen entstehen. Der Motor für den Wandel der Sprachen sind die Sprachkontakte, die neue Sprachen hervorbringen. Dieser Vorgang kann sowohl durch Ausdifferenzierung einer früheren Sprache, wie bei den Töchtern des (Vulgär-)Lateins, oder umgekehrt durch Vermischung geschehen, wie bei der Entstehung des Englischen. In letzterem Fall hat das normannische Französisch das Angelsächsische der britischen Insel überlagert.

In der Evolution des Menschen muss man unterscheiden zwischen der biologischen und der kulturellen Evolution. Die menschliche Sprache hat an beiden Entwicklungen teil. Wäre nicht der Kehlkopf des homo sapiens tiefer gesunken als er noch beim Australopithecus gelagert war, könnte der Mensch nicht seine differenzierten Laute artikulieren. Wäre sein Gehirn nicht imstande, in Symbolen zu denken, könnte er nicht seinen Lauten Bedeutung zuordnen.

Während die biologische Anlage den Menschen zum Sprechen befähigt, sind die konkreten Sprachen eine kulturelle Schöpfung der entsprechenden Gemeinschaft. Dass Sprachwandel in langen Zeiträumen fast un bemerkt geschieht, lässt uns leicht vergessen, wie der Mensch ständig in die Gestaltung seiner Sprache eingreift.

Sprachschöpfung

Eine Sonderform der Sprachgestaltung ist die bewusste Erfindung einer neuen Sprache, wie zum Beispiel des Esperanto. Esperanto wird heute von verstreut lebenden Menschen in allen Kontinenten gesprochen, seine Sprecher besitzen ein starkes Zusammengehörigkeitsgefühl. Die Sprache Esperanto ist aus einem Buch hervorgegangen, das am 26. Juli 1887 in Warschau veröffentlicht wurde. Dieses enthielt die Grundstruktur der neuen Sprache, beschrieben zuerst auf Russisch und dann nacheinander in Ausgaben auf Polnisch, Deutsch, Französisch und Englisch.

Sprachimperien

Das war zu einer Zeit, als der europäische Imperialismus seinem Höhepunkt zutrieb und zur Eroberung der noch nicht kolonisierten Teile der Welt ansetzte. Und jede Kolonie sollte selbstverständlich die Sprache des jeweiligen Eroberers übernehmen. Die Konferenz zur Aufteilung Afrikas unter die europäischen Mächte fand 1884/85 in der deutschen Reichshauptstadt Berlin statt.

Wirtschaftsimperien waren und sind auch Sprachimperien. Das britische Weltreich ging als Sieger aus der Konkurrenz um diese Vorherrschaft hervor. In der Folge des Streits um die Weltmacht zerlegten sich wenige Jahrzehnte später die europäischen Imperien in zwei aufeinander folgenden Weltkriegen gegenseitig. Die durch diese Katastrophe angestoßene Entkolonialisierung blieb jedoch bis heute unvollständig.

Kultur der Verständigung

Zum Selbstverständnis der Esperantosprecher gehört im Gegensatz zum kolonialen Denken das Ja zur Solidarität aller Nationen der Welt. Eine Politik des Ausgleichs, nicht der Herrschaft, ist die Grundlage des Zusammenlebens auf der einen Welt. Ausgleich kommt nicht von selbst, er braucht die bewusste Anstrengung für die Verständigung von Mensch zu Mensch. Vertrauensbildende Maßnahmen sind wirksamer als Drohgebärden, die leicht eine Spirale der Gewalt in Gang setzen.

Probleme des Zusammenlebens durch Gewalt lösen zu wollen, ist wie eine ansteckende Krankheit. Gewalt erzeugt Gewalt. Der Waffenhandel ist heute das größte Krebsübel der Menschheit. Wie kommen wir aus der Haltung heraus, auf Waffengewalt statt auf Verständigung zu setzen?

Verständigung schafft Sicherheit

Nicht die Gewalt schafft Sicherheit, sondern das Kennenlernen der anderen. Das Wissen um ihre Bedürfnisse baut die Angst ab und zeigt Wege für sinnvolle Lösungen. Sich für die anderen zu interessieren macht Fremde zu Bekannten. Esperantosprecher interessieren sich in der Regel mehr für fremde Sprachen als der Durchschnittsbürger. Schon wenige Sätze in einer fremden Sprache sagen zu können oder zu verstehen, macht den betreffenden Fremden weniger fremd. Esperanto hat das Potenzial, Begegnungsbrücke zu sein.

Die Unvernunft nationaler Populismen ist heute vielerorts zu beklagen. Denkende Menschen halten solche rückwärtsgewandte Kurzsichtigkeit für brandgefährlich. Aktive Esperantosprecher wenden sich gegen Abgrenzung und nationalen Egoismus. Die Philosophie, die hinter Esperanto steht, kann man prägnant so zusammenfassen: Wir alle sind Menschen.

Schöpferischer Wandel

Esperanto ist eine Kulturschöpfung, die dem Wandel dient. Der Wandel von der Konfrontation zur Begegnung ist nicht nur eine politische, sondern eine gesamtgesellschaftliche Aufgabe. Das koloniale Denken steckt noch tief in unseren Anschauungen drin. Es kommt im Verhalten der politisch Mächtigeren gegenüber den politisch Schwächeren allenthalben zum Ausdruck. Um die Arroganz der Macht zu überwinden, braucht es unsere bewusste Verständigungsarbeit. Die ist nur möglich durch Verständigungswillen.

Alois Eder

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2016-2018

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro	Reta versio (pdf)	Papera versio	Kolora ekzemplero
2016	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2017	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj
2018	5 eŭroj	8 eŭroj	15 eŭroj

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

AMIKA TAGO en Freiburg la 25an de junio 2016

La Frajburgaj esperantistoj kore invitis al **AMIKA TAGO en Freiburg** je la **25a de junio** 2016. Tre interesa propono estis farita: komuna ekskurso al monto Schauinsland per publika transporto inkluzive de telfero.



La stacidomo de Freiburg estis la rendevuejo por la partoprenantoj. Fakte pluraj preferis alveturi la urbon per regionaj trajnoj ol uzi proprajn aŭtojn. Tie akceptis nin Ursula kaj Manfred.

Ĉu la vetero estos sufiĉe taŭga por grimpi la monton eĉ per telfero? Ursula sekurece proponis nuligi la telferan grimpadon kaj viziti la urbon, sed ĉiuj aliaj pli aŭdace insiste deziris ĝui la faman monton Schauinsland, spite al abunda nubaro en la ĉielo.

Tiu propono estis akceptita, tiam per publikaj transportoj, tramo, buso kaj telfero, ni atingis la supran telfer-stacion. Tie troviĝis liberaj tabloj kaj benkoj, kiuj allogis povis akcepti piknikantojn. Tiam ne plu ekestis la demando: ĉu unue grimpi pli supren aŭ unue pikniki. La loko estis tiom taŭga kun bela panoramo, ke nia grupeto tuj ekokupis la tablojn. Kaj jen iom post iom la nuboj malaperis, la ĉielo heliĝis, tio ankoraŭ pli agrabligis nian amikan tagon.





Manfred proponis poste atingi la supron de la monto, kie troviĝas granda turo. Kelkaj kuraĝuloj volonte sekvis lin kaj ĉe la monto-supro trovis altan turon. De ties supro eblis ĝui eĉ pli vastan panoramon, eĉ al la Vogezoj en Francio. Sed tute supre forte blovis la vento.

La reveno okazis en du grupoj laŭ la horaro de la trajnoj.

Ursula proponis viziton al la eta muzeo en Schwabentor, sed ĝi estis jam fermita. Tiam ni retroviĝis en la salono de la Frajburga grupo, ĉe Treffpunkto. Tie Ursula regalis nin per kafo, kuketoj, fragoj ktp. Tiel finiĝis tiu tute agrabla Amika Tago. Dankon al



Fotoj de Ginette kaj Andreo

al Frajburga grupo.



Les rues de Mulhouse. Histoire et Patrimoine

Rue du Docteur Zamenhof

Le Docteur Zamenhof, inventeur de l'Espéranto, s'est vu dédier, par décision du Conseil Municipal du 9 décembre 1932, une rue de Mulhouse la même année qu'Aristide Briand et Jules Ferry, sans doute en référence à leur partage des mêmes idéaux humanistes.

Entre la rue d'Illzach et la rue de Capitaine Dreyfus se trouve une petite rue en angle droit: c'est la rue du Docteur Lazare Louis Zamenhof (15 décembre 1859 - 14 avril 2017). Ce médecin juif qui naît à Bialystok, en Pologne sous protectorat russe, vit au milieu de Polonais, Russes, Allemands, Lithuaniens et Juifs, cinq communautés hermétiques les unes par rapport



aux autres, dont les sentiments entre elles allaient de la haine à l'indifférence. Le Docteur Zamenhof pense que l'étanchéité linguistique est la principal facteur d'isolement de populations. Il eut ainsi l'idée de créer une langue neutre, en marge de la langue maternelle, qui amènerait chacun à comprendre l'autre et permettrait à l'humanité de se retrouver. En 1887, âgé de 28 ans, il publie un petit fascicule "Lingvo Internacia" qu'il signe Doktoro Esperanto.

Cette utopie reçoit un accueil chaleureux dans le monde entier et un mouvement international se crée pour son développement avec un certain succès au début du 20^e siècle. En 1905 Zamenhof publie son "Fundamento de Esperanto" qui explique et fige les principes de base, la structure et la formation de l'espéranto qui est l'exemple le plus réussi de langue artificielle. Il y a des associations espérantistes dans le monde entier et l'espéranto reste encore pratiqué à Mulhouse par un petit nombre de personnes.

Le Docteur Zamenhof, désespéré par l'effondrement des idéaux internationalistes et humanistes meurt en 1917.

En 1940, les Allemands choisissent le nom de Baldung: il s'agit de Hans Baldung, dit "Grien" en vertu de sa propension à utiliser des pigments de couleur verte (1484/85 - 1545), célèbre peintre et graveur allemand, élève de Dürer. Il serait né à Weyersheim et a beaucoup travaillé à Fribourg et à Strasbourg.

Après la Libération, la rue a retrouvé son nom:

"Rue du Docteur Zamenhof".



Sources: "Les rues de Mulhouse. Histoire et Patrimoine", par le Conseil Consultatif du Patrimoine mulhousien et le concours de la Société d'Histoire et de Géographie de Mulhouse, Editions 2009.

Jar-fina komuna manĝo en Sausheim



Ekestis tradicio okazigi komunan manĝon fine de la lerno-jaro. Laŭ spertoj, ĝi prefere okazu ne sabate aŭ vendrede, sed ĵaŭde vespere, kiam plej multaj ne havas alian samtempan okupon. Tion ankaŭ konfirmis eta reta enketo, per nia dissendo-listo, pri la preferoj de datoj kaj lokoj.

Ĝi krome ankaŭ ebligu al lernantoj de la Esperanto-kurso en Espace 110 renkontiĝi kaj konatiĝi kun aliaj membroj de nia grupo.

La 13an de junio ni estis 11 el la regiono de Mulhouse kaj de Saint-Louis, kiuj troviĝis en la restoracio "Le Vinci" en Sausheim. Ni ĝuis trankvilan lokon sur la malantaŭa teraso de la restoracio.

Amikaj babiladoj ebligis pli bone interkonatiĝi, despli ke ankaŭ gastis s-ino Pag Kyong-Ohg origine el Koreio (nun loĝanta en Saint-Louis). Ŝi klopode provas lerni la lingvon. Ŝajne tie sin proponis kelkaj instruemuloj.

La vespero finiĝis en amika etoso kun interŝanĝoj de someraj vojaĝ-planoj.

Andreo



Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto

La 27an de junio ja okazis nia lasta verda fadeno de la nuna lerno-jaro. Refoje en la nova restoracio en Saint-Louis, tute proksima al la land-limo al Svislando. "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle,

Tiam ja kunvenis 12 membroj el la grupo de Mulhouse kaj ankaŭ de Bazelo. Ĉiuj ŝatis la novan lokon, kiun elektis Bertrand.



Hotel-Restaurant Porte de France

La temoj estas ege variaj, kelkfoje Bernard volonte konsultas sian komputileton por konfirmi novan fakvorton.

Dum julio kaj aŭgusto okazos la ferioj, tiam ankaŭ estas paŭzo por niaj kunvenoj.

Interkonsente kun la grupo de Bazelo ni decidis pri la kalendaro de venonta verdaj fadenoj.



La venontaj datoj por niaj verdaj fadenoj

- ◆ 26an de septembro en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.
- ◆ 31an de oktobro en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.
- ◆ 28an de novembro en Mulhouse en la kafejo Le printemps, rue du printemps.
- ◆ en decembro estas paŭzo.

Vi estas varme invitataj ilin partopreni por havi la okazon aŭdi Esperanton kaj tute amike babili kun la partoprenantoj.



J'Atteste

J'atteste qu'il n'y a d'être humain
que celui dont le coeur tremble
d'amour pour tous ses frères en
humanité.

Celui qui désire ardemment
plus pour eux que pour lui-même
liberté, paix, dignité.

Celui qui considère que la vie est
encore plus sacrée
que ses croyances et ses divinités.

J'atteste qu'il n'y a d'être humain
que celui qui combat sans relâche
la haine en lui et autour de lui.

Celui qui, dès qu'il ouvre les yeux
le matin, se pose la question :

Que vais-je faire aujourd'hui
pour ne pas perdre ma qualité
et ma fierté d'être homme ?

Abdellatif Laâbi

Le 10 janvier 2015

Mi Atestas

Mi atestas, ke estas homo
nur tiu, kies koro pro amo tremas
por ĉiuj siaj hom-fratoj.

Tiu kiu arde deziras
pli por ili ol por si mem
liberecon, pacon, dignon.

Tiu kiu konsideras, ke la vivo
estas eĉ pli sankta
ol liaj kredoj kaj liaj diaĵoj.

Mi atestas, ke estas homo
nur tiu, kiu senlace kontraŭbatalas
la malamon en si kaj ĉirkaŭ si.

Tiu kiu, ekde kiam li matene
malfermas la okulojn,
metas al si la demandon :

Kion mi faros hodiaŭ
por ne perdi mian kvaliton
kaj mian fieron esti homo ?

Abdellatif Laâbi

La 10an de januaro 2015

Poème extrait de l'anthologie "Je rêve le
monde, assis sur un vieux crocodile".

Éditions Rue du Monde, 2015

Abdellatif Laabi est un poète, écrivain et
traducteur marocain, Prix Goncourt de la

Poésie et Grand Prix de la Francophonie de
l'Académie Française en 2011. Il a fondé
en 1966 la revue Souffles qui jouera un
rôle considérable dans le renouvellement
culturel au Maghreb.

Les moutons vont à l'abattoir. Ils ne disent rien, et ils n'espèrent rien. Mais du moins ils ne votent pas pour le boucher qui les tuera et pour le bourgeois qui les mangera. Plus bête que les bêtes, plus moutonnier que les moutons, l'électeur nomme son boucher et choisit son bourgeois. Il a fait des Révolutions pour conquérir ce droit.

Octave Mirbeau, "La Grève des électeurs", *Le Figaro*, 1888

La ŝafoj iras al la buĉejo. Ili diras nenion, kaj ili esperas nenion. Sed almenaŭ ili ne voĉdonas por la buĉisto, kiu mortigos ilin kaj por la burĝoj, kiuj manĝos ilin. Pli stulta ol la bestoj, pli ŝafema ol la ŝafoj, la balotantoj voĉdonas por sia buĉisto kaj elektas sian burĝon. Ili (*tamen malsamaj homoj* NR) faris Revoluciojn por konkeri tiun rajton.

Oktave Mirbeau, "La Striko de la elektantoj", *Le Figaro*, 1888

Tut-taga ekskurso al Bojnice okaze de UK en Nitro

Kiel tute kutime la merkredo de la kongresa semajno estas rezervita al tuttagaj ekskursoj. Estis proponitaj 8 tiaj ekskursoj. Luj kongresanoj preferas elekti tute privatajn ekskursojn.

Jen la ekskurso E2 al la kastelo de Bojnice kaj poste al Supra Nitro kun vizito al subtera brunkarba minejo.



La kastelo Bojnice estas bone videbla de granda parto de "Supra areo de Nitra rivero". Ĝi estas romantika kastelo kun parte konservita gotika kaj renesanca bazo.

En la 17a jarcento, kiam la familio Turzoj formortis, la kastelo fariĝis reĝa posedaĵo. En la jaro 1644 ĝin la reĝo donacis al la familio Palfioj,

kiu ĝin en dua duono de 17-a jarcento rekonstruigis en barokan stilon. Tiun ĉi rekonstruon oni pro alta arta valoro respektis ankaŭ dum postaj konstruaj modifoj. Dum tiu ĉi rekonstruo estiĝis en la jaro 1662 baroka kapelo kun unika stuka volbo, al kiu estis aldonita figura fresko kun religiaj temoj. En la jaroj 1889 ĝis 1910 la lasta feŭda posedanto Johano



Francisko Pálfi faris lastan grandan rekonstruon, en novgotika stilo. Dank' al tiu ĉi rekonstruo la kastelo akiris siajn karakterizaĵojn kaj nuntempan aspekton. Johano Francisko Pálfi persone, ĝis sia morto en 1908, partoprenis la rekonstruon. Kiel ekzemplon li prenis precipe monumentajn mezepokajn eŭropajn arkitekturojn de Italio kaj Francio.



La tuta grupo forlasis la kastelon por tagmanĝi en proksima restoracio.



En la posttagmezo la celo estis vizito al iama minejo de brunkarbo.

La enkonduko al la minejo aspektis tre komplika, ĉar ja necesis noti la nomojn de ĉiuj vizitontoj pro sekureco, simile kiel oni faras por la ministoj por eniri la minejon.

Ni ricevis multajn klarigojn pri la funkciado de la minejo fare de pasia fakulo. Post tiom komplikaj formalajtoj, ni ĉiuj ricevis labor-vestaĵojn, kaskon, lampon kaj pezan baterion. Jen ni troviĝas en alia etoso, en alia mondo.



Por atingi la minejon mem, necesis veturi per speciala subtera flava trajneto dum 20 minutoj. Kelkfoje estis nenia lumo, ni veturis en plena malhelto. Finfine aperis iom da lumoj, efektive ni alvenis al iu stacio, tamen ankoraŭ ne atingis la celon.



De tie la tuta grupo marŝis ankoraŭ pli ol unu km-on en malhelaj galerioj. En la mezo fluis akvo, ni atente kaj malrapide paŝis.

En la atingita loko oni ne plu laboris, sed eblis iom kompreni en kia etoso laboris la ministroj, kiom da teknikaĵoj postulis tia laboro. Certe interesa sperto.

La reven-vojo estis la sama, unue piede, poste per trajneto

ĝis kiam ni fine reatingis la "eksteran mondon". Ni redonis la vestaĵojn, la materialon, la pezan baterio-sakon. Jen denove "liberaj".



Nia aŭtobuso revenis al la studenta universitato. Vespere okazis sur la ĉefa placo de la urbo koncerto por la kongresanoj kaj ankaŭ por la publiko.



La 101-a Universala Kongreso en Nitro, Slovakio

Eblas legi raportojn ĉe :

<http://uea.org/kongresoj>

Jen pripensinda raporto (Pribina n^o4 – 26 julio) :

Esperanto-kurso ĉe Duolingo

Pri Esperanto-kurso ĉe Duolingo prelegis ĝia kreinto Chuck Smith. Ĉiutage aliĝas mil personoj, el kiuj tridek sukcese finas la kurson. La kurso estas anonima, tial ne eblas diri, kiuj konkretaj kursanoj estas el konkreta lando. Tamen oni scias, ke **la kurso plej furoras en Usono inter 18--25-jaruloj, kiuj ne ŝatas klubojn kaj asociojn, sed kreas mem retajn strukturojn kaj komunumojn. Ekzemple en diskutejo Telegramo estas 750 esperantistoj, plejparte el Duolingo, kiuj tie kreis propran komunumon.** Tamen ankaŭ UEA klopodas interesi la kurs-finintojn per diversaj proponoj. Oni kalkulas ankaŭ kun versioj en aliaj mondlingvoj. Estas jam preskaŭ preta la hispana versio; oni planas rusan, ĉinan, francan, germanan.

Tra la reto kaj jutubo

Prezento de la bita eldono de Donkiĥoto (kun etaj partoj en la hispana)

<https://youtu.be/Vmb-quPgYa0>

Asorti kantas "En restoracio", en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto

<https://youtu.be/vxaWI2Dp278>

Jen 5-minuta filmo pri la 75a Hispana Kongreso de Esperanto kaj la 26a Seminario por Aktivula Maturigo

<https://youtu.be/c1AZrHYhfh0>

José María Salguero faras enkondukan prezenton pri Ekstremaduro (Extremadura) en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto:

<https://youtu.be/ypRYexE3WeQ>

Miguel Fernández kantas "En vesper' aperis pluv'" (Esta tarde vi llover) en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, 2016.

<https://youtu.be/XAqfXhyl07c>

Mikaelo Bronŝtejn deklamas sian poemon "Vivresumo" (kun subteksto), en la 75a Hispana Kongreso de Esperanto, 2016.

<https://youtu.be/bkERt200BHE>

BAVELO kaj Esperanto France-Est invitas al



38a BAVELO-seminario

4a – 6a novembro 2016 – Rastatt

Dum la seminario ni loĝos refoje en Bildungshaus St. Bernhard, komforta seminariejo apud la centro de la urbo. Rastatt estas malgranda urbo, tamen plenplena de Eŭropa historio: 1714 en la freŝkonstruita kastelo okazis la intertraktado kaj la sigelado de la *Paco de Rastatt*, per kiu estis finita la *Milito pro la hispana sukcedo* – fora konsekvenco de tio estas interalie la plifortiĝo de la



Martin
Ptasinski

angla lingvo. Unu parto de la bukeda kurso estas dediĉita al ĉi tiu epoko tre interesa, tre influa ĝis hodiaŭ, sed tamen preskaŭ forgesita.

Kiel kutime ni proponas kursojn por komencantoj, progresantoj (Martin Ptasinski, maldekstre), ekparolantoj kaj bukedan kurson. Nova propono estas la ebleco plispertiĝi pri instruado per observado de sperta instruisto en la kurso de la progresantoj.

En la bukeda kurso ĉi foje estos interalie parto pri publika agado kun Lu Wunsch-Rolshoven (dekstre) kaj Bruno Flochon, alia pri la historio de Rastatt kaj Eŭropo, nome pri la *Milito de hispana sukcedo* kaj ĝiaj konsekvencoj ĝis hodiaŭ (Ramon Perera kaj Alois Eder), pri novaĵoj el la libroservo (Jean-Luc Thibias).

Ekskursoj al la regiona muzeo kaj – akompanata de ĉarma kortegulino – tra la urbocentro.



Lu
Wunsch



Aliĝilo (laŭ-eble elektronike al: Inge.Simon@esperanto.de;
Inge Simon, Brünnner Str. 20, 73431 Aalen, +49-7361-360 615)

Kotizo: 30 €

Aparta oferto por junuloj ĝis 27: 60 € por ĉio
(kotizo, tranoktadoj, manĝoj)

Mi partoprenas la kurson

- komencantoj progresantoj paroliga
 bukeda instruobservado

Tranoktado (kun matenmanĝo)	vend/sabate	sab/dimanĉe	1 / 2 noktoj
<input type="checkbox"/> 1-lita ĉambro (kun duŝo)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	75 / 110 <input type="checkbox"/>
<input type="checkbox"/> 2-lita ĉambro (kun duŝo)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	55 / 80 <input type="checkbox"/>
<input type="checkbox"/> 2-lita ĉambro (sen duŝo)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	40 / 60 <input type="checkbox"/>
<input type="checkbox"/> 4-lita ĉambro (sen duŝo)	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	35 / 50 <input type="checkbox"/>

Manĝoj:	vendrede	sabate	dimanĉe	po
matenmanĝo		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	10 <input type="checkbox"/> *
tagmanĝo		<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>	15 <input type="checkbox"/>
vespermanĝo	<input type="checkbox"/>	<input type="checkbox"/>		11 <input type="checkbox"/>

(* inkluzivita en la tranoktado)

- Mi ŝatas vegetare manĝi
 Mi ŝatas vegane manĝi
 Mi havas alergion kontraŭ _____

Pagenda: _____ + _____ + _____ = _____
(kotizo) (tranoktado) (manĝo) (kune)

(nomo kaj persona nomo)

(retadreso)

(poŝtadreso: strato, poŝtkodo, urbo)

(telefono)

(nask.jaro) (loko, dato)

(subskribo)

La aliĝo validas post alveno de via kompleta pago sur nia konto:

De Francio eblas pagi per ĝiro al nia konto
CCP: Esperanto-France Est 1997 72 W Nancy:
Per ĉeko sendata al nia kasisto André Grossmann
5 rue des Pyrénées 68390 Baldersheim

Bildungshaus St. Bernhard	
An der Ludwigsfeste 50 76437 Rastatt Tel: 07222 104 660 Fax: 07222 104 6610	Koordinatoj : latitudo: N 48°51'45.6" longitudo: E 8°12'11.8"

BAVELO-Konto **IBAN:** DE21 6945 0065 0010 4179 22

BIC: SOLADES1VSS (Sparkasse Schwarzwald-Baar)

Alveturo: < <http://www.st-bernhard-rastatt.de/anfahrt/> germanlingve >

... per publikaj transportiloj

Rastatt estas trajnstacio de la vojo Karlsruhe – Baden-Baden – Basel. La seminarejo estas atingebla de la stacio Rastatt per taksio, buso, piedoj (1,1 km).

Piede sur Bahnhofstraße direkte al „Stadtmitte“ ĝis trafikluma vojkruciĝo turnu dekstren kaj sekvu la ŝildojn „Krankenhaus“, post 900 m dekstre estas Bildungshaus St. Bernhard.

Buso 231 direkte al Wintersdorf ĝis haltejo „Am Hasenwäldchen“. Sekvu la veturatan direkton sur „Zaystraße“, post 50 m maldekstre estas Bildungshaus St. Bernhard.

... per aŭto

Rastatt aŭte atingeblas per ekspresvojo A5 (Karlsruhe–Basel). Venante sur A5 prenu elveturejon **Rastatt Süd**, daŭrigu direkte al Rastatt sur B3. Sekvu la straton per preskaŭ 5 km, post maldrekstra Mercedes-Benz-Kundencenter turnu dekstren je la sekva trafikluma vojkruciĝo. Post 800 m situas Bildungshaus St. Bernhard maldekstre. Aŭtolasejoj estas en korto.

La kursoj kaj la instruistoj

komencantoj – Rotraud Wetzel

progresantoj – Martin Ptasinski

instruobservado – (observi la instruiston de la progresantoj)

paroliga – Edmilson Lima Serejo

bukeda – Lu Wunsch-Rolshoven kaj Bruno Flochon, Ramon Perera kaj
Alois Eder, Jean-Luc Thibias, Bernhard Eichkorn

Programo

vendredo, 4 novembro

14:30 – 17:00 eventuale ekskurso por fru-alvenintoj

17:00 – 18:00 alveno, aliĝo, ekloĝado en la ĉambroj, pliaj informoj

18:00 – 19:00 bonvenigo kaj vespermanĝo

19:00 – 20:00 enkonduko

ekde 20:15 vespera programo (konatiĝo, ludo)

poste knajpo

sabato, 5 novembro

07:30 – 08:30 matenmanĝo

09:00 – 11:45 kursoj

12:00 – 13:00 tagmanĝo

14:00 – 17:00 ekskurso (Riedmuseum – muzeo pri la regiona vivo)

17:00 – 18:00 la libroservo prezentas

18:00 – 19:00 vespermanĝo

danckurso kun Jochen

poste knajpo

dimanĉo, 6 novembro

07:30 – 08:30 matenmanĝo

08:30 – 09:00 redono de ĉambroj

09:30 – 11:45 kursoj **aŭ** ekskurso

12:00 – 13:30 resumo, tagmanĝo, adiaŭo

poste ebleco partopreni specialan gvidadon tra

la ekspozicio „Rompiĝemaj valorajoj“ en kastelo Favorite
(entute 12 €)



Mulhouse du foje honoris la famegan kreinton de Esperanto

1932- Sinjoro Aŭguste Wicky ano de la “Franca Sekcio de la Internacia Laborista partio” (en la franca la SFIO) kaj urboestro de la Bollwerk-Civito (1925-1940) decidis nomi “Docteur Zamenhof” modestan straton ortanta al tiu de alia fama homo: Capitaine Dreyfus. La saman jaron 2 aliaj stratoj ricevis la nomon de Aristide Briand kaj de Jules Ferry. Estis epoko kiam Mulhouse honoradis grandajn homojn, kiuj kundividis saman idealon pri libereco kaj ĵusteco.

1940. Oni bone scias la korinklinon, kiun portis Hitler al la esperantistoj, kiuj tre rapide estis aŭfable invititaj, inaŭguri kune kun la sam-seksemuloj kaj politikaj kontraŭuloj la unuajn koncentrejojn. Nu, liaj akolitaj en Mulhouse decidis forviŝi dum “1000 jaroj” la nomon de la krimulo Zamenhof, kiu tiel perdis sian straton.

1944. Feliĉe, la Reich de Sinjoro Hitler ne sukcesis atingi pli ol 12 jarojn, kaj la nova urboestro, kiu ŝanĝis la nomon sed ne la politikan partion: sinjoro Lucien Gander, re-donis al nia kara Ludwig Lejzer la meritindan straton. Nature, ni prave opinias, ke estu estinta preferinde, uzi la okazon, por pli forte re-honori Zamenhof, donacante al li la plej faman straton de Mulhouse nomitan antaŭ la germana okupo “rue du Sauvage” (la strato de la Sovaĝulo) sed probable tio ne estis decidita, ĉar ĉiuj ja sciis, ke Zamenhof tute ne estis sovaĝulo.

Jacques

Renkonto kun Lyme-malsano

En Esperantujo oni bone ŝatas naturon, promenadon, marŝon aŭ migradon, tamen survoje povas trafi nin malamiko perfida trompa kaŝema kaj precipe ĝi povas danĝeri. Kaj kiel, ĉiu scias tion, unu esperantisto avertita valoras du, kaj ĉar ni krome ne estas tre nombraj, plibone memori kiel reagi kontraŭ tiu danĝera ĝenulo. La iksodo estas la insekto kiu kaŭzas la ne tre konatan “malsanon de Lyme” (lajm) Ĝi troviĝas ĝenerale en la arbaro, somere, printempe kaj aŭtune. Sed ĉiuj iksodoj ne danĝeras. Tamen spertuloj asertas, ke ĉe ni en niaj arbaroj la risiko pligrandas. .



iksodo

Simptomoj:

1-unue oni sentas jukaĵojn, kaj nature oni skrapas la korpan lokon, kie pikis la insekto.

2-se hazarde okazis infektado, tiam iom post iom formiĝos ĉirkaŭ la pika-
ĵo, kaj, ruĝos aŭreoloj pli kaj pli grandaj.

3- post kelkaj tagoj tiuj aŭreoloj malaperas

4) pli malfrue viruso povas ataki la cerbo-spinan sistemon.

Kuracado kaj antaŭzorgo:

-plibone promeni en arbaro kun longaj pantalonoj. Post la promenado
ĉiam bone observi la tutan korpon.

-se iksodo eniris korpan lokon, ne ĝin demandu ĉu ĝi estas danĝera aŭ
ne (la ruza ĉiam rifuzas respondi) sed provu vi mem forigi ĝin, tamen neniu
parto de la insekto devas resti. Kelka-foje la operacio estas delikata, tiam pli-
bone konsulti apotekiston aŭ kuraciston. Ĉiamaniere tuj kiam la ruĝaj aŭreo-
loj aperas vi nepre devas viziti kuraciston, kiu tuj preskribos antibiotikojn.

Do ni ne timu, sed ni estu singardaj

Bonan promenadon, Jacques

La vinberoj

Kvar mizeruloj almozpetis antaŭ la granda moskeo, kiam elirinte el ĝi, viro donis
al ili almozon.

- Prenu tiun moneron kaj aĉetu al vi, kion vi volas! Li diris al ili.
- Mi scias kion ni faros, diris la unua, kiu estis persa. Per tiu mono ni
aĉetos “angour”-ojn, kiujn ni kundividos.
- Ne, diris la dua, kiu estis araba. Mi volas “inab”-ojn.
- Tute ne, diris la tria, kiu estis turka. Nek “angour”-ojn nek “inab”-ojn, ni
aĉetos “uzum”-ojn.
- La kvara estis greka, kaj li ankaŭ ne samopiniis.
- Mi, kion mi volas, estas “stafil”-ojn.

Kaj ilia disputo neniam finiĝis.

Tamen, sen tion scii, ĉiu en sia propra lingvo petis la samon: vinberojn. Bela
grapolo por dispartigi ĝin inter ili cele kvietigi ilian malsaton kaj soifon.

Fabelo de la persa mistika poeto Rumi (1207-1273)

En ateliero de la filozofo:

La lingvo havas teruran povon: alproksimigi aŭ disigi la homojn. Unue, ĉar ĝi
malsame nomas la aĵojn sed ankaŭ (kaj tiu fabelo forgesas tion) ĉar ĝi
transdonas kulturon kaj propran manieron vidi la mondon.

Cetere, eĉ se ni parolus la saman lingvon, ĉu la problemoj de komunikado
malaperus? Ĉu estas nur la lingvo, kiu disigas kaj dividas nin?

Les philo-fables (La filozofaj fabeloj) de Michel Piquemal

MEDITERANEA ESPERANTO-SEMAJNO 2017

Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)

4 - 11an de Marto 2017

Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...

Aliĝkoto: 60 eŭroj (familia aliĝkoto: 100 eŭroj)

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :

Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88

Christine Graissaguel, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus Retadreso:kris_grai@hotmail.fr - tel. 04 94 95 66 18

ĜENERALAJ INFORMOJ

Alveno : De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo **Le Val d'Esquière Les Issambres**, aŭ per taksio.

Akcepto : sabaton la 4an de Marto je la 15a horo - **Fermo** : sabaton la 11an de marto je la 14a horo.

Kurs-horaroj : 9.00 ĝis 12.00 kaj 18.00 ĝis 19.00

Partopreno en kursoj (3-nivelaj) : Elektu vian deziran kurson en la ĉi-suba tabelo.

Liberaj posttagmezoj por : bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.

Ne forgesu viajn marŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.

Distraj vesperoj far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp.

Eblas bankuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.



ALIĜILO AL M.E.S. 2017

partoprenanto	Nomo/persona nomo	Naskiĝ-jaro	Kurso
1a			
2a			
3a			
Adreso			
Telefono: _____		Ret-adreso: _____ @	
Mi loĝos ĉe Résidence Le Val d'Esquièrè: jes /ne			
Mi partoprenos de la 4a de Marto ĝis la 11a de marto 2017 : jes / ne			
Sendu al Christine Graissaguel (vidu adreson ĉi-apude)			

ALIĜKOTIZO (ne repagebla) :

- Plenkreskulo : 60 € Paro : 100 €
 (senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

LOĜADO

- Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : x 360 € = €
 Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x --- € = €
 Suplemento por unulita ĉambro:) : x 110 € = €
 Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

- Trajne (St Raphaël) Fluge (Nico)
 Memveture je lahoro.

EVENTUALA MESAĜO VIA :

kursoj	Kursgvidantoj	Nivelejoj
1	Nina KORJHENERSKAIA	Komencanto
2	Marek BLAHUS	Parolanto
3	Dalia PILECKIENE	Diskuto/analizo

RESUMPAGO

Aliĝkotizo €
 Restado €

 TUTA SUMO €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de
 "Esperanto club St Raphaël-Fréjus",
 sendota kun aliĝilo al: *Christine
 Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du
 Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio*)
 - aŭ **per bankoĝiro** al :
 Société Marseillaise de Crédit
 IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980
 0020 041 BIC: SMCTFR2A ESPERAN-
 TO-CLUB- 83700 ST RAPHAEL



Kongresnumero: _____

ALIĜILO por la 69-a kongreso de IFEF
16-a ĝis 23-a de majo 2017
Colmar Francio

LKK-adreso: André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM Francio

Retadreso: jeanripoche@wanadoo.fr
 andreo.ag16@free.fr

Familia nomo	Persona nomo	Naskiĝjaro		
Adreso				
Telefono: _____ Poŝtelefono: _____				
Ret-adreso: _____ @ _____				
IFEF-ano <input type="checkbox"/> jes <input type="checkbox"/> ne <input type="checkbox"/> viro <input type="checkbox"/> virino				
Mi antaŭpagas jenan sumon _____ eŭroj				
per <input type="checkbox"/> ĝiro <input type="checkbox"/> franca ĉeko <input type="checkbox"/> UEA-konto de TAKE				
Kongres-kotizoj en eŭroj		Ĝis	Poste	Sumo
		31.12.2016		
IFEF-membro		60	80	
Familiano, junulo ĝis 30 jaroj, kaj IFEF membro loĝanta en B-landoj laŭ UEA-difino		30	40	
Ne IFEF-membro		70	90	
Ĉambro-perado		5		
D1a: Urbovizitado Colmar, piede		3		
D1b: Urbovizitado Colmar per trajneto, 45 mn		10		
D2: Fervoja muzeo Mulhouse		22		
D3: Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj		18		
Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – T1: Strasburgo, Obernai		40		
Tranoktado laŭ elekto (minimume 1 nokto)				
Libervola donaco al la kongresa kaso				
Postkongresoj				
Marde 23.05	09.00 18.00	Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr : Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki	35	
Merkrede 24.05	09.00 18.00	Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki	35	
			Sume	

Ĉambro-mendilo por la hotelo Primo Balladins, 5 Rue des Ancêtres, Colmar

Nepre menciui, kaze de plurlita ĉambro, la kunloĝanton/-jn! Alie vi pagos la prezon por unulita ĉambro.

Mi loĝos kun:kongres-numero.....

Mi mendas la jenajn noktojn (bonvolu signi)

Hotelaj prezoj en eŭro: por unu nokto kaj unu persono, inkluzive kun matenmanĝo.

Noktoj.	14-15	15-16	16-17	17-18	18-19	19-20	20-21	21-22	22/23	23-24	24-25	25-26

Colmar - Hotelo Primo Balladins, dustela			
1 lita ĉambro		49 €	
1 lito en 2-lita ĉambro		31 €	
1 ĉambro kun duobla geedza lito (por 2 personoj)		62 €	
1 lito en 2-lita ĉambro por handikapitoj (entute 3 ĉambroj)		31 €	
1 lito en 3-lita ĉambro		24 €	
1 lito en 4-lita ĉambro		22 €	
Pagoj por Francio: Per ĝiro al André Grossmann CCP 819 34 U Strasbourg aŭ per franca ĉeko al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM		Internacia ĝiro al: André Grossmann IBAN: FR6920041010150081934U03669 BIC: PSSTFRPPSTR aŭ al UEA-konto de TAKE ekat-i	

ĜENERALAJ INSTRUKCIOJ

- Ĉiu partoprenanto bonvolu pleniĝi kaj sendi apartan aliĝilon por la kongreso al la adreso de LKK.
- Sendu la pagon nur en Eŭro al la indikita bankkonto de la LKK. Oni traktos la aliĝilon nur post alveno de la pago.
- Se vi pagas por alia persono, kiu nepre devas sendi apartan aliĝilon, menciui precizajn informojn pri la koncerna persono: nomo, lando, kompleta adreso.
- Kongres-kotizo neniukaze estas repagebla. La pagoj por la ceteraj servoj estas repageblaj post la depreno de 10% por administrado, kondiĉe ke LKK ricevos la **malmendon ĝis la 31-a de marto antaŭ kongreso.**
- LKK konfirmos la akcepton de ĉiu aliĝilo post la ricevo de la koncerna pago per indiko de via kongresa numero kaj de ĉiuj antaŭmenditaj kaj antaŭpagitaj servoj.
- LKK havas la rajton ŝanĝi la prezojn, se alta inflacio aŭ aliaj ne antaŭvideblaj kondiĉoj postulus tion.**

Mi konfirmas, ke mi konsentas kun la ĝeneralaj instrukcioj presitaj en ĉi tiu aliĝilo kaj aparte deklaras, ke mi havas san- kaj akcident- asekuron por mia restad-periodo en Francio dum la 69-a IFEF Kongreso kaj Postkongreso.

Mi konsentas (ne konsentas), ke mia retadreso estu skribita en la kongresa libro (forigu netaŭgan).

Mi venos en Colmar per la-an de majo 2017 je la-a horo.

Loko, dato:.....Subskribo:.....

Word plenegebla aliĝilo A4 estas elŝutebla ĉe:
<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

PROVIZORA PROGRAMO

Mardo 16.05	10.00 – 21.00 17.00 – 18.00 18.00 – 19.00 19.00 –	Akceptejo / Informejo, en akceptejo de la hotelo Kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK, hotelo Kunsido de la IFEF-estraro Interkona vespero - Itala restoracio apud hotelo
Merkredo 17.05	08.00 – 10.00 10.00 – 12.00 13.00 – 20.00 12.00 – 12.30 14.00 – 18.00 20.30 – 22.00	Akceptejo / Informejo, en akceptejo de la hotelo Solena Inaŭguro, salono Catherinettes Akceptejo / Informejo, en akceptejo de la hotelo Komuna fotado, Gazetara konferenco Urbo-vizitado (D1a, b) – Colmar (piede aŭ per trajneto) Vin-gustumado komuna por ambaŭ grupoj Kultura programo: La grupo "VOGESIA" de Colmar salono Catherinettes
Jaŭdo 18.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 14.00 – 16.30 14.00 – 16.30 16.45 – 18.00 20.00 – 21.00 21.00 – 22.00	Nepublika komitat-kunsido , Catherinettes E-kurso en la hotelo Kunsido de la Faka Komisiono, salono Catherinettes Ateliero pri informadiko, Catherinettes Movadaj aferoj; kunsido de la laborgrupoj, publika Catherinettes Prelego pri la regiono: Elzaso/Alzaco - Edmond Ludwig Catherinettes Venonta kongreso sin prezentas Catherinettes
Vendredo 19.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 14.00 – 18.00 20.00 – 21.00 21.00 – 24.00	Plenkunsido ; salono Catherinettes E-kurso en la hotelo Ekskurso D2 – Fervoja muzeo Mulhouse Prelego: Vizitu Baraton per trajno , Liba kaj Floréal Gabalda Catherinettes Dancvespero kun Fernando , Catherinettes
Sabato 20.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 09.00 – 11.00 09.00 – 11.00 11.00 – 12.00 14.00 – 19.00 20.30 – 22.00	Libroservo funkcias, Catherinettes E-kurso en la hotelo Kunsido de FFEA , Catherinettes Kunsido de la Faka Komisiono, salono Catherinettes Movadaj aferoj; kunsido de la laborgrupoj, publika Catherinettes Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawirh - Ĝardeno de vivantaj papilioj Kultura vespero - Koncerto de Grazia Barboni , Italio Catherinettes
Dimanĉo 21.05	09.00 – 12.00 09.00 – 12.00 12.00 – 12.30 15.00 – 15.30 15.30 – 17.30 19.30 – 23.00	Libroservo funkcias; Catherinettes Ĉefa prelego kaj fakprelegoj , salono Catherinettes Solena fermo Kunveno de la IFEF-estraro kaj LKK; hotelo Kunsido de la IFEF-estraro; hotelo Ĝisrevida vespero, Catherinettes
Lundo 22.05	09.00 – 19.00	Tuttaga ekskurso – Strasburgo, Obernai

RIQUEWIHR

Riquewihr estas unu inter la plej tipaj mezepokaj vilaĝoj kun siaj trabfakaj domoj. Ĝi situas iom flanke de la alzaca vinstrato meze de la vitejaro kaj famas pro siaj delikataj vinoj. Jam en la 14-a jarcento ties vinoj estis eksportataj tra la tuta Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacieco kaj pere de la komercaj kontoroj de la ligo de la Hansaj urboj.



Bedaŭrinde la loĝantoj baldaŭ suferis pro la ribeloj de la kamparanoj (ĉirkaŭ 1525), kiu pereigis grandan nombron da alzacanoj. Tiam la urbeto iĝis luterana. Rekomenciĝis la suferoj kaj detruoj dum la Tridekjara Milito. Post la murdado sekvis malsatego kaj epidemioj de pesto kaj kolerao. En 1680 la senditoj de la franca reĝo Ludoviko la 14-a okupis Riquewihr, kie la loĝantoj tamen pluivis laŭ la leĝoj kaj kutimoj de la Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacieco sub la aŭtoritato de la grafo de Virtembergo.

Nur dum la Franca Revolucio la familio de la grafoj de Virtembergo estis devigitaj rezigni pri siaj bienoj en Alzaco kaj en 1796 Riquewihr eniris definitive en la Francan Respublikon.

La fortikigita preĝejo de HUNAWIHR

Laŭ legendo la setlejo apartenis al iu paro Huna kaj Hunon, kiu donacis la vilaĝon Hunawihr al la monaĥejo de Saint-Dié en Loreno en la 7a jarcento.

Poste ĝi apartenis al la grafoj de Horbourg kaj poste al la grafoj de Virtembergo. Ĝis la Reformacio la preĝejo allogis pilgrimantojn. Poste ĝi iĝis luterana. Post la Franca Revolucio la luteranoj kaj la katolikoj samrajte uzis la preĝejon. Tiajn preĝejojn oni nomis "simultanaj".

La preĝejo de Hunawihr estas bela ekzemplo de fortikigita preĝejo, kie la loĝantaro rifuĝis kaze de danĝero, ĉar la vilaĝo mem neniam posedis remparojn.

Videblas malnovaj murpentraĵoj pri Sankta Nikolao.



La vilaĝo RIBEAUVILLÉ

Ankaŭ **Ribeauvillé** estas vilaĝo de vinber-kultivistoj kaj de ĉiam la vino estis en la centro de la vilaĝa ekonomio. Jen financaj rimedoj, kiuj instigis al konstruo de imponaj urbaj domoj, eĉ domegoj: vi povos admiri la plej belajn trabfakajn domojn.

La vitejaro grimpas laŭ la deklivoj ĝis la surmona arbaro, kie elstaras tri ruinoj de burgoj, kiuj priĝardas la valon.



La parko de la cikonioj kaj de la lutroj en HUNAWIHR

Vojaĝante tra Alzaco vi malkovros nestojn de cikonioj en multaj vilaĝoj kaj urbetoj. La cikonio estas unu inter la plej konataj marko-bildoj de Alzaco.

Ĉi elegante flugantaj birdoj ja kontribuas al la kreskigo de la regiona loĝantaro per alportado de beboj post antaŭa mendo! Sed en 1982 ĉi tiu bela birdo mem bezonis la helpon de la homoj por trovi la regionon: plurestis nur kelkaj paroj sur niaj tegmentoj, dum komence de la 20-a jarcento, miloj da paroj loĝis tie. Por ree hejmigi ĉi-birdojn en la regionon kreiĝis asocioj kaj ekde 1976 ĉi pribesta parko, en kiu vivas pli ol 150 paroj da blankaj cikonioj akceptas la vizitantojn.



La parko rehejmigas multajn aliajn minacitajn speciojn, ekzemple la lutron.

Vi malkovros en ĉi 5-hektara parko tutan bestaron loĝantan surtere kaj en la akvo kaj evoluantan antaŭ viaj okuloj.

FERVOJA MUZEO (Mulhouse)

La Fervoja Muzeo de Mulhouse malkovrigas al vi la historion de la fervojoj. Vin atendas tie pli ol 60.000 m² da ekspozicioj, 6 vastaj temoj, 8 stacidomaj kajoj, 100 lokomotivoj, vagonoj kaj kromaj fervojaj materialoj. La muzeo estas malferma ĉiutage dum la tuta jaro. Ĝi akceptas individuajn vizitantojn, familiojn kaj grupojn.

**Adreso: 2, rue Alfred de Glehn
68100 MULHOUSE**

<https://www.youtube.com/watch?v=KRFYcs5Ceak>

Spektu kaj ĝuu!



Ekomuzeo (subĉiela muzeo) de Alzaco en UNGERSHEIM

La **EKOMUZEO de Ungersheim** en Alta Alzaco estas subĉiela muzeo, kien estas translokigitaj aŭtentaj trabfakaj domoj.

Ĝi estas vera vivanta vilaĝo: krom la jam menciitaj trabfakaj domoj videblas laboristaj domoj, butikoj, urbodomo, fortikigita turo, festo-halo, farm-domoj, lernejo, lavejo, ĝardenoj kaj kampoj. Ĉiuj domoj (kelkaj inter ili originas en la XV-a jarcento) estas viziteblaj. Ene estas prezentataj la tradiciaj laboroj de la regiono same kiel la diversaj manlaboraj fakoj. En iuj domoj laboras veraj manlaboristoj laŭ malnovaj teknikoj: potfaristo, radfaristo, forĝisto.

Aliloke kostumitaj gvidistoj vivigas la vilaĝon.



Ofte la muzea deĵorantaro (inter ili multaj bonvolemluloj) organizas tradiciajn festojn laŭ la liturgia kalendaro.

En 1989 la apuda rivereto Thur estas devojigita kaj ties akvo nun fluas en la vilaĝa rivero, tiel ke eblas promeni per barko kaj malkovri la revivigitan ekosistemon.

Spektu la filmeton ĉe <http://www.ecomusee-alsace.fr/>

La burgo HAUT-KOENIGSBOURG



Haut-Kœnigsbourg estas mezepoka burgo situanta sur la franca municipo Orschwiller en la departemento Bas-Rhin, en Alzaco. La nuna nomo de la burgo, Haut-Kœnigsbourg, estas la rezulto de la adopto de la germana nomo *Hochkœnigsburg*, kies traduko estas “alta-burgo de la reĝo”.

Ĝi troviĝas je trideko da kilometroj norde de Colmar kaj dominas la tutan alzacan ebenaĵon. Ĝi ebligis kontroli la migradojn tra la Alzaca Ebenaĵo.

La unua skriba mencio pri la burgo datiĝas de 1147. Ĝi apartenis laŭlonge de la jarcentoj al pluraj eminentuloj de la Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacieco.

En la unua duono de la 13-a jarcento, profitante la malfortiĝon de la Hohenstaufen, la dukoj de Loreno estis kaptintaj la burgon. Tiu ĉi estis konfidita al la siroj de Rathsamhausen, poste al la Hohenstein, kiuj tie regis ĝis en la 15-a jarcento.

Fariĝinte nesto de rabantaj kavaliroj la burgo estis konkerita kaj bruligita en 1462 de koalicio ariginta la urbojn Colmar, Strasburgo kaj Bazelo, forta je 500 viroj kaj artileriaj armiloj.

En la jaro 1633, dum la Tridekjara Milito en kiu, inter aliaj, la Svedoj kontraŭis Aŭstrion, Alzaco estis ruinigita.

En julio la svedoj sieĝis la burgon Haut-Kœnigsbourg. Fortaj je kanonoj kaj haŭbizoj, ili konkeris la burgon post kvindekdu-taga sieĝado. Iom poste la fortreso estis detruita per fajrego. La burgo tiam estis forlasita.

Akiris la ruinojn la municipo de la urbo Sélestat. Post la konkero de Alzaco fare de la prusoj la municipo donacis la ruinigitan burgon al la imperiestro Vilhelmo la II-a de Hohenzollern, kiu ĝin rekonstruigis laŭ plano de sia arkitekto Bodo Ebhardt. La bele restaŭrita burgo estu simbolo de germana potenco ĉe la limo al Francio!

Aktuale ĝi estas unu inter la plej vizitataj turismaĵoj en Francio (pli ol 500 000 vizitantoj jare).

STRASBURGO, l'eŭropa urbo!

Strasburgo vin ravos! Por Esperantistoj gravas la informo, ke tie troviĝas la Eŭropa Konsilio, kiu sidejas en la Palaco de Eŭropo. Ĝi arigas aktuale 47 landojn, en kiuj ĝi klopodas funkciigi demokration. En la sama kvartalo lokiĝas la vitra konstruaĵo de la Eŭropa Parlamento, en kiu kunvenas ĉiumonate dum unu semajno la reprezentantoj de 28 landoj. Samkvartale ankaŭ laboras la Eŭropa Kortumo pri Homaj Rajtoj. Tutapude troviĝas la Eŭropa Junulara Centro, en kiu jam seminariis junulaj esperantistoj. Ne mirigos vin, ke apude staras la sidejo de la franc-germana televido-kanalo ARTE.



Sed unue, de malproksime, vin salutos la unika turo de la gotik-stila katedralo. Kun siaj 142,11 m ĝi estis la plej alta konstruaĵo en la mondo de 1647 ĝis 1874. Aktuale ĝi restas la dua plej alta katedralo en Francio post tiu de Rouen. Ĉirkaŭas ĝin la kerno de la malnova urbo, kvazaŭa izolo, ĉirkaŭata de la rivero ILL, kiu pli poste enfluas la riveron Rejno. Trans la placo de la katedralo allogas la klasikstila Palaco de la Kardinalo de Rohan. Same ravos vin la malnovaj histori-plenaj stratoj kaj stratetoj inter la mezepokaj trabfakaj domoj. Trans la rivero allogas la “Neustadt” ĉe la Placo de la Respubliko kun ties german-imperiaj palacoj de la fino de la 19-a jarcento. La urbestro klopodas listigi ambaŭ kvartalojn en la Mondan Heredaĵon de UNESKO.



Ĉiujn vidindaĵojn ankaŭ eblas malkovri per turistaj boatoj, kiuj vin kviete kaj senpene promenigos sur la rivero ILL. Aŭskultu la komentojn ĉe <http://esperantostrasbourg.free.fr/>

La memorigejo pri la Unua Mondmilito LE LINGE

Komence de la Unua Mondmilito, en 1914, Alzaco estis parto de Germanio, kiun Francio deziris plej arde rehavi. Sekve la franca armeo tuj atakis ekde la vogeza montaro, kiu tiam konsistigis la limon inter ambaŭ landoj.

La plej teruraj bataloj do okazis komence de 1914 sur la montoj HARTMANNS-WEILERKOPF (nordokcidente de Mulhouse) kaj sur la monto LE LINGE dominanta la valon de Munster, kiu suferis egajn detruojn. Iom post iom la fronto stabiliĝis kaj la soldataroj ambaŭlandaj enteriĝis en tranĉeojn. Ĉi front-linio ne plu ŝanĝiĝis ĝis la fino de la milito.

La batalkampon de LE LINGE ni invitas vin viziti laŭlonge de la tranĉeoj kaj fortikaĵoj. Apud la memorigejo vasta moderna muzeo vin informos plu. Esperantistoj certe interesos la fakto, ke ĉi muzeo estas iniciita de kolonelo Joseph GROULEMUND, la onklo de nia samideano Pierre GROULEMUND el Saint-Etienne.



KAYSERSBERG

Kaysersberg (germane = la urbo de la imperiestro) menciĝis unuafoje en 1227, kiam Frederiko la II-a, imperiestro de la Sankta Romia Imperio de Ĝermana Nacieco, nepo de Frederiko la Ruĝ-barbulo, ordonis la aĉeton de la eta tiea burgo por strategie kontroli la valon.



La imperiestro Karlo la 4-a vizitis la urbon en 1354. Li tie konsentis la kreadon de la Ligo de la dek urboj, kiuj ricevis la privilegion dependi rekte de la imperiestro.

Dank'al la imperiestro Maksimiliano de Habsburgo la alzaca militestro Lazaro de Schwendi, kiu batalis por la imperio en Hungario, iĝis la loka vokto. Tiu ĉi kunportis el Hungario la vito-specion TOKAJ. Dank'al ĉi donaco la urbo iom-post-iom riĉiĝis.

Bedaŭrinde la Tridekjara Milito (1818 – 1848) ruinigis la urbon. Sed ĝis la Franca Revolucio la nun franca urbo denove retrovis pli grandan loĝantaron.

Dum la 19-a jarcento disvolviĝis en la valo la teksa industrio.

La 14-an de januaro 1875 naskiĝis tie la fama teologo, organisto, kuracisto kaj filozofo Albert SCHWEITZER, kiu kreis en Gabono la ĝangalan hospitalon de Lambaréné. En 1952 li ricevis la Nobelpremiion pri paco.

La muzeo de la urbo prezentas lian vivon.


La ĝardeno de la vivantaj papilioj

Vi malkovros en tropika etoso fascinan kolekton da papilioj el la tuta mondo. Ili libere vivas meze de super-abunda ekzotika plantaro, kaj flugetas ĉirkaŭ vi. Ravos vin la diverseco de la grandoj, de la koloroj de centoj da papilioj el Afriko, Azio kaj Ameriko.

Vi ankaŭ ĉeestos la naskiĝon de ĉi ravaj kaj delikataj bestetoj. Tie vi ankaŭ trovos ideojn por dekoracii viajn hejmajn fenestrojn aŭ antaŭ-domajn ĝardenojn per tutmonda divers-speca floraro.



La itinero de vinoj



La vinberoj de la Alzaco regiono (Alsace) tegas 15.000 hektarojn ŝirmatajn de la oceana influo. Tie ekzistas tri nomoj de kontrolita deveno (AOC), kiuj estas:

Alsace
Alsace Grand Cru
Crémant d'Alsace

La Crémant d'Alsace estas la ŝaŭmanta vino.

Al tiuj nomoj oni povas aldoni la uvan nomon kaj la rikoltan metodon.

La vinoj **Alsace Grand Cru** povas ankaŭ aldoni la nomon de la devena loko.

La kulturataj uvoj en Alzaco estas:

Pinot noir (25%)
Pinot Blanc (aŭ Klevner) (21%)
Riesling (20%)
Gewürztraminer (20%)
Sylvaner (14%)
Pinot Gris (10%)
Muscat (2%)
Chasselas (1%)

Nur Riesling, Gewürztraminer, Pinot Gris kaj Muscat estas permesataj por la Alsace Grand Cru, kaj Pinot Noir oni uzas nur por fari ruĝan vinon.

Kiam la vino estas farita el miksitaj uvoj, ĝi nomiĝas **Edelzwicker**.




Nia Kalendaro 2016

septembro 2016	23 - 30	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a. Ni kune decidis pri la horoj kaj tagoj.
	20 - 27	Prezentado de Esperanto por kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	26	verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse.
oktobro 2016	14 - 21 - 28	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a laŭ interkonsento.
	11 - 18 - 25	Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	31	Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis
novembro 2016	4 ĝis 6	Staĝo de Bavelo kaj EFE en Karlsruhe (programo kaj aliĝilo en ĉi-tiu numero)
	18 - 25	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	8 - 15 - 22 - 29	Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a
	19 - 20	Deĵorado ĉe Bédéciné kaj en Ungersheim ĉe Ekologia foiro
	28	Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 en la kafejo Le Printemps: 7 rue du printemps Mulhouse

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Somero



en Alzaco



en Slovakia